WIKIPEDIA

Makedona lingvo

La **makedona lingvo** (Македонски) estas sudslava lingvo parolata kiel gepatra lingvo de proksimume du milionoj da homoj, precipe en la Respubliko Nord-Makedonio kaj la makedona diasporo, kun pli malgranda kvanto da parolantoj tra la transnacia regiono Makedonio. Ĝi estas la oficiala lingvo de la Respubliko Nord-Makedonio kaj leĝe agnoskata minoritata lingvo en partoj de Albanio, Rumanio kaj Serbio. Ĝia ISO-kodo estas *mk*. Ekzistas Vikipedio en la makedona lingvo.

La norma makedona lingvo efektiviĝis kiel oficiala lingvo de la Socialisma Respubliko Makedonio en 1945 kaj poste evoluis modernan literaturon.[1] La plejparto da la kodigo formaliĝis dum la sama periodo.[2][3][3]

Makedonaj dialektoj formas kontinuumon kun bulgaraj dialektoj kaj pli vastan kontinuumon kun la serbokroataj per la intermezaj torlakaj dialektoj.

La nomo de la makedona lingvo estas polemika afero en Grekio kaj Bulgario,[4] samkiel ĝia distingeco kompare kun la bulgara en Bulgario.[5][6] En Bulgario ĝi estas ofte konsiderata kiel unu el tri lingvaj normoj de la bulgara, la makedona lingva normo. Ĝi ne estas agnoskita de la Instituto por la Bulgara Lingvo ĉe la Bulgara Akademio de Sciencoj. Dum oficialaj kontaktoj inter delegatoj de Makedonio kaj tiaj de Bulgario kaj Grekio, la lastaj ne agnoskas la makedonan kiel memstaran lingvon.

La makedona estas skribata per cirila alfabeto kun tri propraj literoj: ѓ, ќ kaj s.

La moderna makedona ne estas identa kun la klasikepoka makedona lingvo, ankaŭ hindeŭropa lingvo kiun ni konas nur el kelkaj propraj nomoj kaj simile, kaj estis verŝajne tre parenca al la greka, ĉu kiel dialekto aŭ kiel parto de pli vasta hindeŭropa branĉo, kiu inkludus la grekan kaj makedonan.

makedona

Македонски

Mapo de landoj kun makedonparolantoj en la mondo.
(alklalku la bildon por klarigoj)

Parolata en	Nord-Makedonio Bulgario Grekio Albanio
Parolantoj	2 000 000
Denaskaj parolantoj	>1,5 milionoj
Skribo	Cirila skribo
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Nord-Makedonio Agnoskita kiel minoritata lingvo en Albanio Rumanio Serbio
Reguligita de	Институт за македонски јазик „Крсте Мисирков“, Instituto por la Makedona lingvo "Krste Misirkov"
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	mk
ISO 639-2	
Bibliografia	mac
Terminologia	mkd
ISO 639-3	mkd
SIL	MAC
Glottolog	mace1250
Angla nomo	Macedonian
Franca nomo	macédonien
Vikipedio	

Eksteraj ligiloj

- Pri Makedona lingvo (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=mkd) en Ethnologue (angle)
- Ekzemploteskto (http://www.language-museum.com/encyclopedia/m/macedonian.php) en language-museum kun angla traduko
- *Lengua Macedonia (http://www.proel.org/index.php?pagina=mundo/indoeuro/eslavo/macedonio)* (historio, priskribo, mapoj) en Promotora Española de Lingüística (http://www.proel.org/) (hispane)
- Lingva Mapo de Sudorienta Eŭropo (http://www.muturzikin.com/carteseurope/5.htm) (angle, france)
- Elstara artikolo pri la makedona en la "Enciklopedio de la eŭropa oriento" de la universitato de Klaŭdiforumo. (http://wwwg.uni-klu.ac.at/eeo/Makedonisch.pdf) germane
- Lingva Mapo de Balkanoj (http://www.proel.org/index.php?pagina=mundo/europa/balcanes) (hispane)
- Serĉrezultoj (http://www.archive.org/search.php?query=Macedonian) de Rosetta Project (http://www.rosettaproject.org/)

Referencoj

1. ↑ МИА - Македонска Информативна Агенција - НА ДЕНЕШЕН ДЕН (https://web.archive.org/web/20120308121705/http://damj.manu.edu.mk/pdf/0008Dwie%20Gwary%20Macedonskie%202.pdf). Mia.com.mk. Arkivita el la originalo (http://www.mia.com.mk/default.aspx?mId=25&vId=74488315&lId=1&pmId=25) je 2012-03-08. Alirita 2010-08-15.
2. ↑ Gilbert, G.. (2006) *Studies in contact linguistics (http://books.google.com/books?id=60aFAS1crFEC)*. ISBN 978-0-8204-7934-7.
3. ↑ [3,0] [3,1] Friedman, V. (1998) "The implementation of standard Macedonian: problems and results" in *International Journal of the Sociology of Language*, Vol. 131, pp. 31-57
4. ↑ Mirjana N. Dedaić, Mirjana Misković-Luković. *South Slavic discourse particles* (John Benjamins Publishing Company, 2010), p. 13
5. ↑ Victor Roudometof. *Collective memory, national identity, and ethnic conflict: Greece, Bulgaria, and the Macedonian question* (Greenwood Publishing Group, 2002), p. 41
6. ↑ Language profile Macedonian (http://www.lmp.ucla.edu/Profile.aspx?menu=004&LangID=42), UCLA International Institute

Slava lingvaro

Okcidentslavaj	ĉeĥo-slovakaj (ĉeĥa lingvo • slovaka lingvo • knaana lingvo) • soraba lingvo (suprasoraba lingvo • malsuprasoraba lingvo) • leĥaj lingvoj (pola lingvo • pomoria lingvo (kaŝuba lingvo • slovinca lingvo) • polaba lingvo)
Sudslavaj	okcidentaj sudslavaj lingvoj (kroata lingvo • bosna lingvo • montenegra lingvo • slovena lingvo • serba lingvo • serbokroata lingvo) • orientaj sudslavaj lingvoj (makedona lingvo • bulgara lingvo • malnovslava lingvo) ...
Orientslavaj	belorusa lingvo • ukraina lingvo • rutena lingvo† • rusina lingvo • rusa lingvo • Malnova Novgoroda dialekto†

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Makedona_lingvo&oldid=6679035"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 18:14, 7 aŭg. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.